

Sud-Rejna Kuriero

Junio
2017

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°66

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Ĉi-tiu numero aperas iom pli malfrue, nur en junio. Verdire la monato majo estis plene okupita pro la IFEF-kongreso en Colmar.

Pluraj membroj de nia asocio estis anoj de LKK kaj multe laboris por la organizado de tiu evento.

Vi legos en ĉi-tiu numero pri tiu kongreso kaj pri nia regiona staĝo, kiu okazis samtempe ekde vendredo.

Nia Ĝenerala Membro-Kunveno okazis la 10an de februaro, raportas pri ĝi Ivo.

Dume en Saint-Louis okaze de la Libro-foiro aperis bela budo pri Esperanto.

Ni deziras al vi ĉiuj agrablajn somerajn feriojn en Esperantio, por ĝui la lingvon kaj por agrable pasigi tempon kun samideanoj.

Havu agrablajn spertojn.



Afiŝo ĉe la kongresejo en Colmar, ĉe la salono Catherinettes

André Grossmann

Lundo 26.06.2017 Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis

SOMERA PAŬZO

Ĵaŭdo 28.09.2017 Monata kunveno : Somero

Lundo 30.10.2017 Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis

Ĵaŭdo 23.11.2017 Monata kunveno : Programo

Sabato 09.12.2017 Zamenhofa festo en Svislando

Nicole Bérout

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2017-2019

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Reta versio (pdf)	Papera versio	Kolora ekzemplero
2017	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2018	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2019	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

Berichte aus der Region Basel Frankreich

2017 kommt das Tram nach Saint-Louis – jetzt träumt man schon von der Verlängerung zum Euroairport.

Für Saint-Louis hat die Verlängerung des Trams 3 zum Euroairport (EAP) Priorität, für Basel ohne Wenn und Aber der EAP-Bahnanschluss.

Die Elsässer haben zuerst im Blick die Erschließung ihres Entwicklungsgebiets im Nord-Osten des Flughafens. Das bedeute natürlich nicht, dass Saint-Louis gegen den Bahnanschluss wäre. Ginge es beim Tram um innerstädtische Infrastruktur so bediente der Bahnanschluss, dessen Kosten mit 220 Millionen Euro veranschlagt sind einen deutlich größeren Perimeter.

Die massgeblich mit Schweizer Bundes- und Kantonsmittel mitfinanzierte Tram N°8 nach Weil beflügte den Einkaufstourismus jenseits der Schweizer Grenze.

Die Verlängerung der Tramlinie 3 erschließt eine rund 3 Kilometer lange Strecke zwischen der heutigen Endstation in der Burgfelder Straße und dem Bahnhof Saint-Louis. Diese 500 Meter verlaufen auf französischem

Territorium, Kosten knapp 92 Millionen. Die Eidgenossenschaft beteiligt sich mit 35 Prozent der Gesamtkosten oder rund 33,6 Millionen Franken.

Über diese 1. Etappe hinaus werden in Saint-Louis inzwischen weitere Verlängerungsetappen diskutiert.

Deutschland

Der Einkaufstourismus Richtung Deutschland nimmt immer mehr zu.

2016 ging es um 11 Milliarden Euros und 17,6 Millionen abgestempelte Zettel. Nun kommt Bewegung in die Problematik nachdem die zwei Schweizer Großverteiler in Bern vorgeschlagen haben. Interesse zeigte die Bundesregierung im Augenblick als klar wurde, dass dem Schweizer

Staat somit ca. 550 Millionen an Mehrwertsteuer jährlich abgeht. Eine Lösung wäre den jetzigen Freibetrag von 300.-- auf 50.-- Euros pro Einkauf zu senken.

Asocio Mulhouse-Espéranto Ĝenerala membro-kunveno La 10an de februaro 2017

Ĉeestantoj: Anne, Irène, Simone, Andreo, Bertrand, Edmond, Roberto, Yves.

Akcepto de la lastjara raporto pri la Ĝenerala Membro-Kunveno.

Agad-raporto fare de la sekretario. La raporto estas unanime akceptita.

Financa raporto fare de la kasisto.

La raporto montras tre malaltan deficiton. La enhavo estas de 811,51 €

La raporto estas unanime akceptita.

Prezentado de la membro-listo: lastjare ni estis 22 membroj aŭ abonantoj 21 en februaro 2017.

Renovigo de la komitato: Finiĝis la mandato de:

Alexandra Mussabini

Anne Vernet

Bertrand Wick

Alexandra Mussabini ne plu kandidatiĝas.

Alain Sarrasin ne plu membras en la asocio kaj ne povas resti en la komitato.

Irène Lemart akceptas eniri la komitaton.

Edmond Ludwig kandidatiĝas anstataŭ Alain Sarrasin.

Ambaŭ membroj estas unanime nov-elektitaj.

La komitato nun konsistas el:

Prezidanto:

André Grossmann

Sekretatio por la franca:

Robert Kueny

Sekretario por Esperanto:

Yves Stutz

Kasisto:

André Grossmann

Eksteraj rilatoj kaj propagando:

Jacques Pineda kaj Simone Kiry

Asesoroj:

Irène Lemart, Anne Vernet,

Edmond Ludwig, Bertrand Wick.

Kurso por komencantoj kaj progresantoj:
Nuntempe ni havas 1 komencantinon kaj 3 progresantojn.

Parolado pri la manko de komencanto.

Fejsbuko: Bertrand kreis fejsbukajn paĝojn por Mulhouse-Espéranto. Ĝi alportis 28 ŝatantojn, 29 sekvantojn, 25 amikojn.

SRK regule aperis.

6 monatoj post la apero de la bulteno, ĝis estos videbla en la retejo de Mulhouse-Esperanto.

La membro-kotizo kaj abono al la bulteno restas la neŝanĝitaj, malgraŭ plialtiĝo de poŝtaj tarifoj.

Daŭre funkcias niaj 2 dissendo-listoj:

Verda babilejo

Mulhouse Esperanto

Andreo ŝanĝos la dissendon liston de Mulhouse-Esperanto de yahoo al google. Tio falicigos la administradon.

Estontaj agadoj: partopreno en manifestacio:

Bédéciné: diskuto pri la trafeco de la ĉeesto de la asocio.

Ekologia Foiro de Ungersheim.

Vivu Via Strato: post kelkaj jaroj, ni forlasas tiun manifestacion. La ĝenerala etoso ne vere taŭgas por ni.

Tagoj de la asocioj en Carré des Associations?

Libro Foiro de St Louis?

Diversaĵoj:


Mondo de Esperanto ne plu aboneblas: Andreo klopodos por ekhavi ekzemplerojn por disdoni al la membroj.

Biblioteko daŭre funkcias, sed estas malmulte uzata.

Dissendo-listo: ĝi estu ne nur por la membroj sed ankaŭ por tiuj kiujn la membroj proponas.

Bertrand rakontas pri la virino de Thann, kiu trovis loĝejon por sia filo, studento, en Upassala dank'al sveda esperantisto kontaktita de Bertrand.

Yves Stutz



**Mulhouse-Espéranto
kaj**

esperanto
France-Est

Organizis la 81an Regionan Staĝon de Esperanto En Colmar de la 19a ĝis la 21a de majo 2016.

En majo 2017 nia loka asocio Mulhouse-Espéranto kunorganizis la

69an Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson

en Colmar. Pro tiu ampleksa surloka organizado, ne eblis trovi sufiĉe da fortoj por la organizado de printempa staĝo en marto aŭ en aprilo.

Krome neniu grupo en nia Orienta Federacio akceptis tiun taskon.

Tial ekestis la solvo, ke

la 81a Regiona Staĝo de Esperanto-France-Est okazu en la kadro de eĉ pli grava aranĝo, nome de la

69a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso.

Certe nia staĝo ne havis la kutiman programon kiel dum aliaj staĝoj. Ali-flanke eblis ĝui la allogan programon de tiu IFEF-kongreso kaj havi la eblecon pri novaj kontaktoj, novaj spertoj. La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Mulhouse kun turisma gvidado fare de Edmond Ludwig. Por la distra vespero ni ĝuis la koncerton de Grazia Barboni el Italio. Krome estis ankaŭ ebleco aliĝi al la ekskursoj de la postkongreso.

Fakte Colmar estas ege pitoreska kaj ĉarma urbo, kiu allogas multajn turistojn. Al la kongreso aliĝis 147 personoj el 22 landoj, preskaŭ ĉiuj loĝis en la Hotelo Primo Balladins, la salono Catherinettes estis plaĉa kongresejo. Pluraj kongresanoj alvenis jam lunde la 15an de majo, kaj plej multaj ekde la 16a de majo.

La staĝo estis proponita nur ekde vendredo la 19a de majo. Luj staĝanoj profitis por tuj partopreni la unuan viziton al la fervoja muzeo de Mulhouse. Al staĝo aliĝis preskaŭ 20 personoj, sed ili estis miksitaj kun la kongresanoj de IFEF-kongresoj.

58. SHANGHAI 2006	69. COLMAR 2017
59 - PARIS 2007	
60 - POZNAŃ 2008	
61- TRIESTE 2009	
62 - SOFIA 2010	
63. LIBEREC 2011	
64. HERZBERG am HARZ – la ESPERANTO-URBO 2012	
65 – ARTIGUES	



IFEF, Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio havas longan tradicion pri IFEF-kongresoj, kiuj okazas plej ofte en la monato majo, en Eŭropo, sed ankaŭ en Azio, en Ĉinio (en 2006 kaj 2015). Plej ofte ili estas organizitaj de lokaj fervojistaj asocioj. Tamen la organizado en Colmar estis iom alia. Neniu el la LKK estas fervojisto.

Necesis adaptiĝi, interkonsenti, kunlabori, aŭ eĉ proponi novajn metodojn, por finfine atingi la rezulton de sukcesa IFEF-kongreso 2017 en Colmar.

Cheminots espérantophones du monde entier à Colmar

Venus de 22 pays – Chine, Cuba, Autriche, Lituanie... –, des cheminots parlant l'espéranto tiennent congrès à Colmar jusqu'au 23 mai. L'espéranto a été créé en 1887 par un médecin polonais, le Dr Ludwik Zamenhof, dans le but de promouvoir la paix : langue universelle, ne dépendant pas d'une nation, elle évite la domination d'une langue – et donc d'un pays – sur une autre. Et elle est simple à apprendre. « Nous sommes environ 3 millions d'espérantophones dans le monde », indique Jean Ripoche, de la fédération internationale des cheminots espérantophones. L'histoire n'a pas permis à cette langue de prendre son essor, « mais aujourd'hui des gens se lèvent contre des systèmes, pourquoi ne se lèveraient-ils pas contre le système dominant anglophone ? »

Au fait, pourquoi des cheminots ? Il existe une centaine d'associations de locuteurs, internationales, nationales, professionnelles, culturelles, religieuses... et donc des cheminots. Durant ce congrès, ils retransposent en espéranto les nouveaux termes techniques ferroviaires qui sortent chaque année et des conférences permettent de découvrir la situation du rail selon les pays. **F. Ma.**

COLMAR DNA 21.05.2017

Des cheminots espérantophones du monde entier

Venus de 22 pays – Chine, Cuba, Autriche, Lituanie... – des cheminots parlant l'espéranto tiennent congrès à Colmar jusqu'au 23 mai. L'espéranto a été créé en 1887 par un médecin polonais, le Dr Ludwik Zamenhof, dans le but de promouvoir la paix : langue universelle, ne dépendant pas d'une nation, elle évite la domination d'une langue – et donc d'un pays – sur une autre. Et elle est simple à apprendre.

« Nous sommes environ 3 millions d'espérantophones dans le monde », indique Jean Ripoche, de la fédération internationale des cheminots espérantophones. L'histoire n'a pas permis à cette langue de prendre son essor, « mais aujourd'hui des gens se lèvent contre des systèmes, pourquoi ne se lèveraient-ils pas contre le système dominant anglophone ? » Au fait, pourquoi des cheminots ? Il existe une centaine d'associations de locuteurs,

internationales, nationales, professionnelles, culturelles, religieuses... Et donc des cheminots. Durant ce congrès, ils retransposent en espéranto les nouveaux termes techniques ferroviaires qui sortent chaque année et des conférences permettent de découvrir la situation du rail selon les pays.

F. MA.

Aperis en la ĵurnalaj DNA kaj L'Alsace la ĉi suba artikolo la 22.05.2017.

Jean Ripoche et Monique Grall, de la Fédération internationale des cheminots espérantophones

« L'espéranto relie les peuples »

Propos recueillis par Françoise Marissal

La Fédération internationale des cheminots espérantophones tient son congrès annuel jusqu'à ce mardi à Colmar. 145 personnes de 22 pays – dont la Chine, Cuba, l'Espagne, la Suède – y participent.

Une Fédération internationale des cheminots espérantophones ? En quoi consiste-t-elle ?

Nous appartenons à l'Association mondiale de l'espéranto située à Rotterdam ; nous sommes une centaine de fédérations dans le monde, nationales ou internationales, des cheminots, scientifiques, constructeurs, des associations politiques, artistiques, des associations de jeunes...

La tâche de notre association est de transposer en espéranto les termes ferroviaires. Chaque année de nouveaux termes ou nouvelles nomenclatures ferroviaires sont créés par l'Union internationale des chemins de fer ; nous les retransposons ensuite en espéranto. Cette année nous avons une trentaine de termes à étudier. C'est aussi l'occasion de se connaître entre cheminots du monde entier, de prendre connaissance de leur situation suivant les pays, par le biais de conférences.

Que représente l'espéranto aujourd'hui dans le monde ?

Les estimations varient de 1 à 10 millions de locuteurs, mais 3 millions semble le bon chiffre, et la langue est parlée dans 120 pays. En France, nous sommes à peu près 1 000 personnes. Il y a certains pays où elle est beaucoup plus pratiquée, comme la Chine et la Hongrie.

L'espéranto vise à être une langue universelle. Pourquoi n'y a-t-il pas plus de monde ?

Il est certain que notre nombre diminue, et



Pour Jean Ripoche et Monique Grall, « L'espéranto est une langue où chacun fait un pas vers l'autre. »

Photo L'Alsace/Françoise Marissal

pourtant le rêve n'avait eu Ludwik Zamenhof en 1887 d'une langue universelle, est toujours d'actualité : elle permet de relier les peuples sans idée de domination d'une langue sur une autre. C'est une langue où chacun fait un pas vers l'autre ; tandis qu'avec l'anglais, la langue la plus parlée aujourd'hui, vous aurez toujours une domination de celui dont c'est la langue maternelle.

Qu'est-ce qui explique cela ?

L'espéranto a souffert de l'histoire : il a eu son heure de gloire au début du XX^e siècle, mais comme son but était de promouvoir en évitant les problèmes de communication, la Première Guerre mondiale lui a porté un coup terrible. De plus, la langue était particulièrement pratiquée en Allemagne et en Russie ; ses locuteurs

ont été persécutés par les nazis et en URSS.

L'espéranto a pu reprendre après la Seconde Guerre mondiale, mais à ce moment-là, l'anglais s'était imposé... Et les tenants de l'anglais n'ont aucun intérêt à laisser l'espéranto revenir, ils perdraient leur position dominante.

L'espéranto peut-il rebondir ?

Qui sait ? On voit les gens se lever contre certains systèmes. Pourquoi ne le feraient-ils pas contre la domination de l'anglais ? L'espéranto est neutre et simple à apprendre ; son vocabulaire est latin, sa structure et sa grammaire sont asiatiques. Et chez les cheminots, nous avons un beau slogan : « la reloj ligas la landojn, esperanto la popolojn. » « Les rails relient les pays, l'espéranto relie les peuples. »



En Colmar, la salono Les Catherinettes estis taŭga kongresejo por tiu kongreso. Sur la podio aperas membroj de LKK kaj komitatanoj de IFEF.



Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto

La 29an de majo nia verda fadeno refoje okazis en la restoracio en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome.

Jen okazo por diskuti pri la ĵus okazinta IFEF-kongreso, kie kelkaj el niaj membroj deĵoris kiel anoj de LKK. Certe abundis la

diversaj taskoj por akcepti la alvenantojn kaj disdoni la kongresajn dokumentojn en la unuaj tagoj (Bernard kaj Andreo). Poste por gvidi la homojn dum pluraj ekskursoj, multe laboris Edmond. Michel efike laboris por mendi la diversajn busojn kaj manĝojn en Strasburgo. Li prizorgis bildkartojn kaj poŝtmarkojn kaj klopodis akcepti la kongresanojn per kugelhupoj kaj ŝaŭmvinoj.



Nia lasta verda fadeno estas planita por la 26a de junio en Saint-Louis. Krome, okaze de la lerneja jarfino ni planas komunan festmanĝon.

Libro Foiro en Saint-Louis

Rande de la Libro Foiro en Saint-Louis estis unuafoje organizita Libro Bazono la 13an kaj 14an de majo, ĉijare. Oni proponis al ni partopreni tiun eventon.

Entute ĉeestis 6 vendistojn de malnovaj libroj kaj ni.

Ni adaptis nian ĉeeston al la temo « Le livre en Esperanto » kaj kreis tiucele afiŝon. Ankaŭ samkiel la aliaj ekspoziciantoj, ni vendis librojn nome « La Eta Princo », « La templo de l'Suno » kaj « L'Espéranto par la méthode directe ».

La Libro Bazono situis ĉe *Croisée des Lys*, proksime de la teatro kaj urbodomo, sed



relative malproksime de la *Forumo*, kie estis la verkistoj.

La vetero ankaŭ estis tre ŝanĝema. Dimanĉe je la mateno restis nur du vendistoj el sep, verŝajne pro la malbona vetero kaj pro la maldensega publiko. Ĉar nur malmultaj vizitantoj preterhastis nian budon.

Finfine ni tamen forvendis librojn por pli/malpli 50 euroj. Ŝajnas ke la plimulto de la interesatoj estis svisoj.

Deĵoris Jacques kaj Bertrand. Anne kaj Eliane helpis munti tendon, ekspozici-tablo kaj la afiŝvando. Vizitis nin la gesamideanoj Odette kaj Bernard kaj alia Bernardo el Strasburgo. Esperanto dankas al ili !

Finfine bona sperto. Esperanto estis tie, meze de Saint-Louis kaj ties Libro-Forumo.



Bertrand





Amikumu estas apo
(poŝtelefona aplikaĵo),
kiu helpas vin trovi kaj kontakti
proksimajn esperantistojn –
ĉiam, ĉie!



simple iru kaj elŝutu



La socia reto Amikumu lanĉiĝis
De Jarlibro al "Horlibro"

En sabato, 22-a de aprilo, lanĉiĝis nova socia reto, Amikumu. Ĝi estas uzebla per saĝtelefonoj kaj montras la cent plej proksimajn Esperanto-parolantojn, kiuj membras en ĝi.

Jam pli ol tri mil aliĝintoj

Ene de unu semajno aliĝis jam pli ol tri mil homoj el certe almenaŭ kvindek landoj. En kelkaj grandaj urboj membras jam pli ol deko da Esperanto-parolantoj.

Kontaktu la retan Esperantujon - aliĝu al Amikumu!

Amikumu donas bonan eblecon por kontakti aliajn Esperanto-parolantojn - oni renkontiĝas unue en la reto kaj povas poste interkonsenti pri rendezuo eksterrete. Jen nova ebleco por trovi la enretajn Esperanto-parolantojn, kun kiuj ĝis nun ne tro facilis eksterreta kontakto.

Por ke tio funkciu, necesas ke ankaŭ la homoj el la tradicia Esperantokomunumo aliĝu al Amikumu kaj prezentu sin tie. Instrukcioj kiel fari troviĝas sur <https://amikumu.com> kaj sube.

De jarlibro al "horlibro"

En 1908 Hector Hodler lanĉis novan ideon - jarlibron, kiu faciligis trovi aliajn Esperanto-parolantojn. La nova ideo, kiun nun realigis Chuck Smith kaj Evillea kun sia teamo, 109 jarojn post Hodler, estas iusence nova versio de jarlibro. Sed tiun ĉi version ni povas nomi "horlibro" (se ne "minutolibro"), ĉar ĝi estas daŭre aktualigata.

Nun vojaĝanto povas kontakti ne nur la lokulojn en ilia hejmo, sed pere de Amikumu ankaŭ aliajn vojaĝantojn, kiuj hazarde troviĝas samloke. Kaj la lokulo povas vidi, kiu vizitas lian aŭ ŝian urbon.

Artikoloj ĉe "Libera Folio" kaj "Ondo de Esperanto"

Unuajn impresojn pri la nova oferto vi povas legi ĉe Libera Folio <http://www.liberafolio.org/2017/04/23/amikumu-rapide-ekhavis-pli-ol-mil-novajn-uzantojn/> (kun unua mondmapo de Amikumu-anoj) kaj ĉe Ondo de Esperanto

<http://sezonoj.ru/2017/04/amikumu-4/>

Kaj ne forgesu aliĝi al Amikumu por ke la tuta Esperantujo estu videbla - al novaj lernantoj, al konversaciemuloj kaj al la tuta mondo. Konkrete: Iru per via saĝtelefono al la "vendejo" (fakte: distribuejo) de saĝtelefonaj aplikaĵoj ("apoj") kaj tie elŝutu la **senkoston** aplikaĵon.

La poŝtelefona aplikaĵo Amikumu, kiu helpas trovi proksimajn esperantistojn, estis lanĉita sabate la 22-an de aprilo. Dum la unua tago ĝi ekhavis pli ol mil novajn uzantojn.

Libera opinio pri nia Esperanto- informlaboro

Post balotaj bedaŭroj

Jacques Pineda

Ekster la fakto ke ĉiuj niaj kandidatoj je la plej altaj ŝtataj respondecoj ne parolis Esperanton, ili havis alian komunan punkton: ili ne kapablis doni al sia programo universalan dimension. Kvazaŭ nia lando estus izolita de la mondo, kvazaŭ hodiaŭ ŝtato povus funkcii laŭ aŭtarcia modelo aŭ eventuale trudi sian propran politikan projekton al la aliaj. Ili forgesis aŭ plivole ignoris la tutmondiĝon, tutmondiĝo priskribita en la historia direkto, do senrevena. Tamen tiu, kiun ni vivas nur je la servo de la ekonomika profito, montriĝas ekologie pereiga

*(prograsa difekto de nia medio) sociale nejusta (ĉie en la mondo plii-
gado de malegaleco de mizero inter la popoloj kaj samlandanoj) kaj pli
kaj pli minaca por la paco (divastigo de konfliktoj, militoj kaj teroris-
mo).*

*La SDNo (Socio De la Nacioj 1920-1945) kaj la UNO (Unuiĝintaj
Nacioj 1946- ĝis nun) farigintaj unue grandan kaj ne kontesteban
paŝon al la homaro, rapide montris malfortecojn kaj limojn de siaj
agadoj, ĝis troviĝi plejparte en sakstrato. Fakte internaciaj prelegoj,
pintaj kunvenoj, intertraktaj tabloj iĝis ejoj, kie ĉiu ĉeestas nur por
defendi siajn propajn interesojn nature neniam similajn. Eĉ sine de
Eŭropo mezureblas la rezisto de la nacioj, trovi interkonsenton pri la
ĉefaj problemoj. Ni aŭskultu Boutros Ghali eksa ĝenerala sekretario de
UNO: "UNO estas nature senpotenca por mem fronti la venontajn
defiojn de la 21a jarcento: ekonomia tutmondiĝo, degradiĝo de la
medio, nuklea proliferado, kreskanta vivnivela malekvilibro inter nor-
daj kaj sudaj landoj" kaj ankaŭ: "Necesas por tio, ke la nacioj, ĝis nun
ĵaluzaj pri sia absoluta suvereneco, konsentu alpaŝi plian paŝon al la
monda demokratio". Jen konstato kaj propono pli kaj pli partigitaj de
famaj sciencaj, filozofaj, politikaj homoj kaj de la ĉefaj ne-registraraj
mondaj organizoj: unu tutmondiĝo homa kaj demokratia, unu mondci-
vitaneco, kiu por ĉiu homo aldonas al siaj du identecoj, t.e. la regiona
kaj la nacia, unu trian: la mondan. Jes nur tiu tutmondiĝo kapablos
garantii al ĉiu pacon kaj prosperon. Kaj estontece neniu progresiva mo-
vado povos preterpasi tiun orientadon.*

*Pri nia kara internacia lingvo, regule promociita de UNESCO, sed
ĉiam obstine ne agnostikata de niaj gepolitikuloj, ni aŭskultu Yvo La-
penna preleganta en Roterdamo en 1966: "Eraro estas, pensi ke la
nacio estas la sola formo, en kiu ni vivas.ni havas tri fonda-
mentajn kadrojn de la kunvivado: la regiono, la nacio kaj la homaro, al
kiuj respondas tri diversaj lingvoj: la loka dialekto, la nacia literatura
kaj la homa neŭtrala supernacia kaj tuthoma lingvo: Esperanto". Kia
simileco inter Esperanto kaj la projekto de homa tutmondiĝo; ĉu ne?*

Jacques

SEP - Somera Esperanto-Perfektigo

Speciala somera oferto

09-22.07.2017

1. Esperanto-lingvokursoj

- Komencantoj
- Progresintoj

2. Programoj

Ĉiutage: 6 instrueroj (de lundo ĝis sabato)

- Posttagmeze: Vizitoj, gvidadoj, ekskursoj, naĝado, biciklado, promonado, festoj, ktp.
- Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, interparoloj, literaturo, ekskursoj

Kostoj

Kurskotizoj: 1 semajno 100 € 14 tagoj = 165 €

Rabatitaj prezoj: ekz. por gestudentoj! Eblas kelkaj stipendioj, bv. demandi!

Tranoktebloj / Ni peras por vi!

- | | |
|---|----------------------|
| 1. favorpreza Esperanto-tranoktejo | 12 € |
| 2. hotelo (3-4-stela, kun matenmanĝo) | 35-60 € |
| 3. privata apartamento (se min. 2 personoj) | ĉ. 20 € persono/tago |
| 4. en propra tendo: | senkosta |

Aliĝilo

Mi partoprenos: de: ĝis: :.....

la sekvan kurson:

Mi venos per trajno.

Mi venos per aŭto.

Mi havas sekvajn rimarkojn:

Mi ŝatus tranokti ĉe:

Mi ĝiras antaŭpagon de 50 € al:

Esperanto-Gesellschaft Südharz en DE-37412 Herzberg am Harz

Sparkasse Osterode, IBAN: DE28263510150101457927

BIC: NOLADE2IHZB

Nomo:

Adreso:

.....

Telefonnumero:..... Dato:.....

Subskribo:

LUMINESK'

27.12.2017 - 03.01.2018

La silvestra renkontiĝo de

Germana Esperanto-Asocio

Por nia renkontiĝo ni elektis la urbon Haltern am See (poŝtkodo 45721) en la suda monastera lando. Nia kongresejo estas seminar-domo de la katolik-sindikata movado „KAB” sur la monteto Annaberg en arbaro apud Haltern am See.

La kongresejo estas sufiĉe komforta. Ni loĝos en dulitaj ĉambroj je preskaŭ hotela nivelo kun banĉambro en ĉiuj ĉambroj. Unulitaj luksaj ĉambroj estas havebla kontraŭ krompago de 15 eŭroj/nokto. Senpaga retaliro (WLAN) haveblas. La retpaĝon de la kongresejo vi trovas per hvhs-haltern.de



Kotizo • Programo Tempo • Teamo

	ĝis 15.08.	ĝis 31.10.	poste
Kotizo*	365	385	399

*: Necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50€.

► **La kotizo inkludas** la restadon (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo). Unulitaj ĉambroj haveblas po 15 eŭroj por nokto.

Ĉiu, kiu loĝas en Germanujo kaj ne estas ordinara membro de GEA/GEJ, krompagas 30 eŭrojn.

► **Kiam okazos la renkontiĝo?**

La aranĝo komenciĝos je la 27a de decembro kaj daŭros ĝis la 3a de januaro. La organizantoj ŝanĝis la tempon je unu tago, ĉar tio ŝajnas esti pli konvena al la deziroj de la partoprenantoj.

Parta partopreno eblas.

► **Teamo**

Andreas Diemel (ĉeforganizanto)

Alfred Schubert (tema programo):

temaprogramo@luminesk.de

Yoshie kaj Dieter Kleemann (gufujo)

Sebastian Kirf (teĥnikajoj, retpaĝoj)



Reage al la artikolo de Jacques Pineda en la numero 65-a de SRK :

En sia reago al artikolo mia en LA INFORMILO 176 Jacques Pineda prave substrekas la engaĝon de la mondcivitanoj por Esperanto.

Pri alia eldiro mi ne samopinias. Post pli ol 40 jaroj da promociado de Esperanto mi tute ne plu kredas, ke politikistoj povus decidi pri adopto de leĝoj favoraj al la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Eĉ kiam prestiĝa politikisto estas mem esperantisto, li nenion imponan povas atingi, pensu simple pri Franz Jonas, iama prezidento de Aŭstrio, eksa SAT-ano, kiu ege flue parolis Esperanton. Li konfesis, ke ion decidan li ne kapablis realigi.

La esperantistoj komprenu, ke ni interesos la politikistojn nur kiam ni estos tiom multnombraj, ke ni povos helpi ilin al venko dum balotoj. Jesja, ofte okazas, ke ili respondas ĝentile al leteroj niaj antaŭ balotoj, sed tio kostas malmulton al ili kaj kelkaj jesaj bultenoj neniam estas neglektindaj!!!

Pro tio ni devas elturniĝi mem kaj trovi mem la rimedon por iĝi amasmovado aŭ pli ĝuste simpla amaso parolanta Esperanton, kun la risko, ke tiam enŝoviĝu en nian movadon fiuloj, kiuj damaĝus la etikan bildon, kiun nia nuna eta movado afiŝas nun. Sed ja necesas elekti: ĉu ni restu popoloeto de afablaj babilantoj aŭ ĉu ni alstrebu la finan venkon! Ĉu agrable "pluraŭmi" aŭ ĉu ni pli kaj pli profesiece promociu nian komunikilon? Vi konsentos, se mi asertas, ke ni plej ofte agadas ambaŭcele.*

Kaj jen: kial – ĝis nun - ni ne sukcesis enigi Esperanton en la ekonomian kaj profesionan vivon. Jen defio alfrontinda! *el*

** Dum la Internacia Junulara Kongreso de TEJO en la jaro 1980, en Raŭmo (Finnlando), estis publikigita manifesto, kiu insistas pri ĝuado de Esperanto en nia diaspora popoloeto. Ni simple ekzistu!*

Nia Kalendaro 2017

<p>Junio</p> <p>2017</p>	<p>2 - 9 - 16 - 23 - 30</p> <p>6 - 13 - 20 - 27</p> <p>28</p> <p>Supozeble inter la 14a kaj 23a</p>	<p>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a aŭ 18a laŭ interkonsento.</p> <p>Kursoj por komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.</p> <p>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis</p> <p>Komuna jarfina festmanĝo vespere je la 19a en la restoracio: Restaurant Des Lys d'Alsace, 106 rue de Strasbourg, 68300 Saint-Louis-Neuweg.</p> <p>La membroj estos informitaj rete pri la ĝusta dato.</p>
<p>Julio</p> <p>2017</p>		<p>Feriado</p>

IFEF eldonis Esperant-lingvan 24-paĝan broŝuron pri la fervoja muzeo de Mulhouse.

Ĉiu kongresano ricevis ekzempleron.

Nia asocio ankaŭ ricevis iom da ekzempleroj.

Eblas ricevi ekzempleron afrankitan por 2 eŭroj.



La Trajno-Centro de *Mulhouse*

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Tuttaga ekskurso al Strasburgo okaze de IFEF-kongreso en Colmar, majo 2017

